

Pri la Novjara Festo

Nian ĉi-jaran Novjara Feston oni rajtas partopreni, same kiel je pasintaj fojoj, sen antaŭa sinanonco, sen aparta pago. Tamen por la klubo mem ekzistas nun situacio ŝanĝiĝinta, kaj malpli favora. Temas pri tio, ke la novaj administrantoj de London Irish Centre malpermesas, ke LEK (aŭ ajna alia ĉambro-luanto) enportu proprajn manĝaĵojn kaj trinkaĵojn. Per tiuj do nin provizos porfeste LIC, laŭ jena poa tarifo: manĝaĵoj £5, vino (unu glaso) £2, suko (unu glaso) £1.

Kvankam tio ja kostos al LEK multe pli ol antaŭe, tamen oni, pro juraj kialoj, ne rajtas vendi alkoholaĵojn, aŭ postuli de ĉiu festonto enirpagon. Sed ĉiu, kiu povas kaj volas iom donaci al la kluba kaso, kompreneble rajtas tion fari, aŭ rekte al la Kasisto, aŭ per aldonaĵo al sia jarkotiza pago por 2013. Tiujn ni anticipe dankas!

Kluba Programo:**januaro:**

- 4 (Neniu kunveno)
- 11 NOVJARA FESTO
- 18 Helen Fantom: "El la Maniko de nia Libroretaro" (1800h: konsilantaro)
- 25 Dramvespero (gvidata de Terry Page)

februaro:

- 1 "Blankaj Elefantoj!" – kunportu senutilan aferon por pridiskuti, kiun vi ial ne povas forĵeti
- 8 John Wells: *Lingva Seminario* (1800h: konsilantaro)
- 15 Matt Peperell: "La Londona Hakejo" – klubo kaj laborejo por teknikemaj kreistoj, kiuj ankaŭ partoprenas sociajn projektojn
- 22 Socia Vespero

marto:

- 1 John Wells: *Lingva Seminario*
- 22 JARKUNSIDO

Blanka Elefanto (vidu 1 februaro)

(bildo © 123rf.com)

La esprimo "blanka elefanto" estas metaforo signifanta:

grandioza sed ĝena posedaĵo, kiun la posedanto ne povas forigi de si, kaj kies valoro aŭ utilo ne meritas la koston (precipe de subteno).

La esprimo originas de rakonto, ke reĝoj de antikva Tajlando havis la kutimon fari "donacon" de tia besto, al kortanoj kiuj malplaĉis al ili, celante bankroti la ricevanton per la kosto de posedo.

En nuntempa lingvouzo, ĝi estas objekto, komerca entreprenado, municipaĵo, ktp, juĝata sen utilo aŭ sen valoro.

Esperanta Kalendaro:

10-12 majo: Brita Kongreso 2013, Ramsgate.
Informo: eab@esperanto.org, 01782 372141
20-27 julio: 98a Universala Kongreso, Rejkjavik, Islando. http://uea.org/kongresoj/uk_2013.html

Aliaj anoncoj:

Prezentu ĉefprogrameron! Se vi havas taŭgan temon kiu amuzos aŭ informos klubanojn, ne hezitu proponi vin al la program-sekretario.

Bv. sendi informon al la bultenisto antaŭ 21a februaro por mencio en la sekva Kluba Bulteno.

Loko, horaro kaj aliaj informoj

Ni kunvenas vendredvespere ĉe Londona Irlanda Centro. Antaŭ la ĉefprogramero kaj dum la paŭzo klubanoj kutime amasiĝas en la komforta enirhalo por kaftrinki kaj babili.

Kutima programo:

18:00 - 19:15 *beginners' class*

19:15 - 20:15 prelego aŭ alia ĉefprogramero

20:15 - 20:45 paŭzo

20:45 - 22:00 forumo, diskuto aŭ daŭrigo de la ĉefprogramero

22:00 fino



Loko: London Irish Centre,
50-52 Camden Square, NW1 9XB
(tel: 020-7916 7272)

Metrostacio: Camden Town

Fervojo *London Overground*: Camden Road

Busoj: 29, 253, 274, 31.

Kotizoj: £10 jare; fora membro: £6 jare.

Kluba retejo:

<http://www.phon.ucl.ac.uk/home/wells/lek>

Lokaj grupoj: Kingston: Roy Cliffe 020-8397 5895;

Orientlondono: Roy Simmons 01473-461346

rokeby@globalnet.co.uk; Sudlondono: Gregory Porilo

020-8672 8095 esperanto-sleg@tiscali.co.uk.

Federacioj: Orienta: John Redgwell, 17 Dover Close, Braintree, Essex CM7 5TD; Sudorienta: Kevin Murray, 11 Leybourne Ave, West Byfleet, Surrey KT14 7HB 01932-345779 yarrump@gmail.com.

Funkciuloj: Honora Prezidanto: Marjorie Boulton; Honoraj Vicprezidantoj: Valerie Atkinson, Husejn Al-Amily;

Konsilantaro: David Thornell (Prezidanto kaj Sekretario), Terry Page (Vicprezidanto), John Wells (Vicprezidanto), Arturo Prent (Kasisto), Anica Page (Registristo), Michael Sims, Antony Rawlinson (Program-sekretario kaj Bultenisto).

Adresoj: David Thornell: Esperanto, c/o London Irish Centre (adreso supre) lek-sekretario@gmail.com;

Arturo Prent: 7 Walton Garden, Hutton, Brentwood CM13 1EJ ap_esp-lek21@yahoo.co.uk,

Terry kaj Anica Page: 7 Hampton, Gt Holm, Milton Keynes MK8 9EP terry_page@btinternet.com, anica_page@btinternet.com,

Antony Rawlinson: 5 Thorpe Crescent E17 5BY acj.rawlinson@ntlworld.com.

Letero de nia Prezidanto

Karaj Klubanoj:

Post la antaŭaj kaj dumaj entuziasmigoj je la Olimpikoj, Paralimpikoj kaj Diamanta Jubileo de la Reĝino, oni atendas pli trankvilan kaj kvietan jaron por Londono en 2013. Ni vidu. Sed ni mem ne komencu la novan jaron tro kviete. Male, ni celebru ĝin per huraoj kaj ridegoj la 11an de januaro. Ĉar ĝuste tiutage okazos nia NOVJARA FESTO. Venu, ĝuu kaj Esperantumu.



Parolante pri gravaj programeroj: Nepre notu la daton de la ne tro fora JARKUNSIDO, kiu okazos la 22an de marto. Alportu antaŭpripensaĵojn kaj sinproponojn, por dividi ilin inter la LEKanojn. Via klubo ja dependas de vi.

Intertempe, oni rajtas taksi 2012 kiel bonan jaron. Ni bonvenigis sufiĉe multe da vizitantoj el diversaj landoj (plej lastatempe el Hispanio kaj Rusio); ni starigis allogajn programerojn (plej lastatempe libro-lanĉon); kaj ni partoprenis ekster-Esperantujajn ceremoniojn (ekz. pri la Titaniko, kies jubileo estis ĉi-jare).

Kvankam la venonta jaro eble montriĝos pli trankvila kaj kvieta por la ĝenerala publiko, tamen ni Esperantistoj laŭdefino devus strebi al ĉiam pli interesa kaj vigla estonteco - precipe klube. Ĉiu eksterlanda vojaĝo, ĉiu aventureto portas eblecon raporteti al aliaj LEKanoj – ĉu pro nova kongreso, plumamiko, libro, aŭ publiko. Samideanoj kiel BRIAN BARKER senĉese kaj senlace montras rimedojn kiel sciigi la eksteran mondon pri Esperanto; do oni certe povas montri inter sammovadanoj kion oni spertis ĉe tiu aŭ alia angulo de Esperantujo.

Alivorte: Spertu kaj diru kion vi spertis! La parola ekzercado mem valoras. Estas pli bone fariĝi tro entuziasma aŭtobiografiisto pri Esperantaĵoj, ol esti ne sufiĉe entuziasma, ĉu ne? Sendube. Eniru do januaron kun plena memfido kaj plena espero - kaj faru tion kune kun kiel eble plej multe da membroj, por krei kiel eble plej multe da bonmemoroj.

Feliĉan Novjaron!

David Thornell